

La Espero

1975-2

Svenska Esperantotidningen

Fondita en 1913

Res, Lär, Koppla av!

KONGRESS!

60:e världskongressen
26 juli—2 augusti 1975
Köpenhamn

Falkoner Centret i Köpenhamn syns ofta i tidningar och TV, när man pratar om stora evenemang i Köpenhamn. I år är det esperantisternas tur att lägga beslag på byggnaden i en vecka. Esperantokongressen beräknas bli en av de fem största kongresserna i Danmark 1975.

Kvinnan kommer att vara ett av de två huvudämnena vid årets kongress. Det hänger förstas samman med att 1975 är det internationella kvinnoåret. Det andra ämnet kan sägas vara anknutet till det första: individens roll i esperantorörelsen. Man kommer att i linje med moderna konferensmetoder ta upp det andra ämnet i mindre arbetsgrupper till diskussion.

I övrigt blir kongressprogrammet späckat, som vanligt. Den som åker på sin första kongress kanske gör klokt i att inte försöka hinna med allt (det går inte). Förutom diskussioner och lättare kvällsprogram bör man dock försöka hinna med ett besök på Carlsberg (med esperanto-talande guide) och några promenader i Frederiksberg Have, som ligger intill Falkoner Centret

Anmälningar: Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö. Avgifterna finns i förra numret av La Espero: 184:— för medl. i UEA (MA), 252:— för icke-medlem i UEA (efter 20 juni kostar det 43 kr mer!), postgiro 14 74 29-5 Esperantoförbundet Specialkonto.



Falkoner Centret.

TILL FREDERICIA, DU SOM ÄR UNG

31-a ungdomskonferensen
19—26 juli 1975
Fredericia, Danmark

”Fredericia-hallen” är inte så känd som Falkoner Centret i Köpenhamn, men den är modern och har plats för både själva konferensarbetet, för avkoppling och för sport.

En ungdomskonferens brukar samla ca 100—200 deltagare (ibland fler), vilket ger en mera intim atmosfär än världskongressen. Ämnet för årets konferens är ”kulturellt utbyte”, och det temat kommer igen inte bara i diskussionsgrupperna, utan också i kvällsprogrammen: där presenteras dels dansk kultur, dels kultur från mindre kända folk.

Ett seminarium om ”språk och avkolonialisering” kommer att ingå i konferensens program, som en fortsättning på en serie seminarier om språk och kultur anordnade av TEJO (den internationella ungdomsorganisationen).

Anmälningar: 31-a IJK, Christian Lauridsen, Østergade 43, DK-7430 Ikast, Danmark. Avgiften ligger något över 300 danska kronor, men då är både mat och logi inräknat.

ARSKONGRESSEN ÄR I HALMSTAD

Esperantoförbundets årskongress
17—19 maj 1975
Halmstad

Det viktigaste på årskongressen är förstas själva årsmötet, där man går igenom förra årets verksamhet och fattar beslut om kommande verksamhet.

Men på en helg hinner man med mer. Man kan åka på utfärd till Tylöhus för att dricka kaffe, man kan gå på gudstjänst, man kan hinna med ett kvällsprogram om ”kvinnan i esperantolitteraturen” (var det någon som sa något om kvinnoår?), och sist, men nästan lika viktigt som själva årsmötet, man kan gå på en diskussion om hur man skaffar och behåller nya medlemmar.

Dessutom blir det då och då en liten stund över för en egen liten promenad i Halmstad eller dess omgivningar, speciellt i närheten av OK Motorhotell, där årskongressen äger rum.

Anmälningar: Se annan plats i tidningen.

Sista anmälningdag:
1 MAJ

EFTER KONGRESSEN: EFTERKONGRESS

Postkongreso 3—6 aug. 1975
Aarhus, Danmark
Dua parto, 6—9 aug. 1975
Göteborg, Sverige

Efterkongresser har man för att känna att det är sommar, se sig om i kongresslandet eller grannlandet, stressa av.

Aarhus är väl lämpat för uppgiften. Staden har anor sedan 900-talet och har ett förflutet som småstad, men har sedan järnvägens tillkomst växt och är nu en universitetsstad och efter danska mått en viktig industristad.

En dag ägnas åt utfärd antingen till Himmelsbjerg eller till Nordsjökusten.

Den som vill förlänga efterkongressandet kan åka vidare med tåg och båt till Göteborg. Även i Göteborg ordnas utflykter, med båt på kanalen, till parker, till historiska minnesmärken.

Anmälningar: Postkongreso de Aarhus, Hørmølløkke 5, DK-8240 Risskov, Danmark, respektive Postkongreso de esperanto parto II, Box 55028, 400 53 Göteborg. Från båda städerna kan man få turistbroschyr på esperanto.

KURSVECKAN I HELSINGØR

Internaciaj ferijaj esperanto-
kursoj
20—26 juli 1975
Helsingør, Danmark

Kurserna i Helsingør är en mångårig pålitlig tradition. Nybörjaren, som inte kan någon esperanto alls, har sin kurs, de som avslutat nybörjarkurs i esperanto har sin kurs, och de som vill lära sig undervisa i esperanto har sin kurs.

Internationella högskolan i Helsingør erbjuder just den omgivning som behövs för en sommarkurs: fin park, nära både till bad och till staden Helsingør, utflyktsmöjligheter. Och i år också närheten till kongressen i Köpenhamn, både i tid och rum.

Anmälningar: S-ino Eva Langkilde, Ingemannsvej 17, DK-3000, Helsingør, Danmark.

KULTUR I GRÉSILLON

Kulturdomo Kastelo Gresillon
1—21 juli, 22 juli—11 aug.,
12 aug.—1 sept.

Slottet Grésillon inbjuder varje sommar till semesterveckor med kurser, konversationsgrupper, hantverk och annan sysselsättning.

I år har man delat in programmet i tre perioder. Under esperanto-veckorna 1—21 juli har man fortsättningskurser i esperanto, kurser i bokbinderi och fotografering, konversationsgrupper och examina. Under de internationella veckorna 22 juli—11 augusti är esperantokurserna utbytta mot föredrag i olika ämnen. Studieveckorna 12 augusti—1 september har ett program som liknar esperantoveckorna.

Dessutom ordnar man förstås utflykter och underhållningsprogram.

Anmälningar: Esperantista Kulturdomo, Kastelo Grésillon, F-49150, Bauge, Frankrike.

Redaktoro:

Ĉi tiu numero de La Espero havas sufiĉe multe da svedlingva tekstoj, ĉar ni volas prezenti ĝin al la komencantoj. Vi povas ĝin ankaŭ montri aŭ doni al eksteruloj.

Kun tiu ĉi numero sekvas aliĝilo por la jarkongreso de SEF en Halmstad dum la pentekosto, 17—19 majo. Ni plurfoje dum la jaroj akcentis, ke ĉiu klubo aŭ grupo devas klopodi sendi reprezentanton al la jarkongreso de SEF. Estas bedaŭrinda fakto, ke niaj kluboj estas malriĉaj kaj ĝenerale ne havas eblecon pagi la vojaĝkostojn, kaj ankaŭ la kontribuoj, kiujn SEF donas al la reprezentantoj estas limigitaj. Tamen, ĉe la jarkongreso okazas gravaj diskutoj kaj decidoj, kaj la interŝanĝo de ideoj kaj opinioj inter la estraro kaj la klubaj reprezentantoj same kiel inter la diversaj kluboj mem, sendube havas grandan signifon por la sukceso de nia movado.

Estas tre dezirinde, ke oni vere esploru la eblecojn instigi iun aktivan membron veturi al Halmstad. Eble via klubkaso tamen permesas ian financon helpon, se necese! Temas pri elspezo por la agado, kiu povas esti same grava kiel multaj aliaj. Ni pliatentu pri niaj jarkongresoj en la sveda esperantomovado!

Halmstad cetere prezentas interesan kongresprogramon tre varian, kaj ni esperas, ke ankaŭ multaj gesamdeanoj, kiuj ne estos oficialaj reprezentantoj de la kluboj, pro personaj utilo kaj plezuro venos tien.

Kopenhago — la 60-a Universala Kongreso de Esperanto — jen la plej granda aranĝo de la esperantomondo tiun ĉi jaron! Niaj amikoj la danoj certe prenis sur sin malfacilan taskon, kiam ili nur unu jaron antaŭe, je la UK en Hamburgo, akceptis aranĝi tiun kongreson. Sed ĉiuj ĝis nun ricevitaj informoj igas nin kredi, ke tiu kopenhaga kongreso estos unu el la plej bone organizataj kaj unu el la plej interesaj esperantistaj mondkongresoj ĝis nun.

Povas esti ke por ni svedoj la urbo Kopenhago ne ŝajnas tiel alloga el turisma vidpunkto — ni eble estis jam plurfoje tie. Sed la kongreso mem certe donos al ni multon — la nova estraro de UEA ne nur sklave sekvas la malnovajn liniojn, kaj ankaŭ la kongresprogramo enhavas parte novajn trajtojn. Cetere, Kopenhago ja estas granda metropolo, en kiu oni ĉiam trovas ion novan.

Guste ĉar tiu ĉi mondkongreso okazas tiel proksime al ni, ni svedoj devas partopreni. Se vi ne jam aliĝis, faru tion tuj!

Parolas niaj legantoj:

ĈU VI ESTAS PLENRAJTA ESPERANTISTO?

Se jes, bone! Se ne, bedaŭrinde! Ĉar en la dua kazo vi riskas interalie perdi vian rajton balote esti elektata, nome, se iu proponos vin kiel kandidaton al Komitato de UEA (= la parlamento de la tutmonda organizaĵo), kiu havas tre rigorajn regulojn tiurilate. Cetere eĉ okaze de la lastjaraj nomigoj de kandidatoj iuj venis en embarason kaj ilian "esti aŭ ne esti" oni pridiskutis. Do, bone gardu vian rajton, vian esperantistan civitancon!

Estas, kiel konate, tri kategorioj de komitatoj, A, B kaj C. La grupon A elektas Landaj Asocioj (en Svedio sekve SEF), komitatanojn B elektas tutmonde ĉefdelegitoj kaj Delegitoj de UEA (nek vic- nek fakdelegitoj partoprenas tiun elekton). Fine, komitatoj C estas elektitaj de la komitatoj A kaj B. Tiel la tuta ABC estas preta kaj plenpova "parlamento"!

Nun vi ankaŭ konsideru, ke vi perdos multe pli. Ekzemple, vi ne povas esti elektita Delegito, Vicdelegito aŭ Fakdelegito de UEA, se vi ne estas plenrajta esperantisto. Krome, vi ne ricevas la valoregajn Jarlibron de UEA kaj la monatan organon Revuo Esperanto, kiuj kune formas aktualan stimulan, sugestan informan kaj diskutatan forumon de la movado.

Tamen, ne timu! Rapide vi povas ŝanĝi la situacion favore al vi mem. Vi pagu la kotizon de individua membro de UEA al la poŝta ĝirkonto n:ro 14 74 29-5 Sveda Esperanto-Federacio, Speciala konto, Malmö. La jarkotizo estas 80 skr. Tiel vi fariĝas plenrajta esperantisto kun ĉiuj favoroj laŭ supre. Samfamilianoj, ekzemple, pagas kotizon de 40 skr, se ili kontentigas je Jarlibro, nepre necesa dum vojaĝoj; fakte, en moderna tempo familianoj ne ĉiam vojaĝas samdirekten, ĉar preskaŭ tro abundas diversgustaj kaj multtipaj Esperanto-aranĝoj, kongresoj, konferencoj, turismaj renkontigoj ktp. Sed, en tiu dua kazo, necesas Familia Interkonsiliĝo, ĉar la demando estas, kiu el la familianoj estu tute plenrajta en UEA? Ĉu la virino (atentu, 1975 estas Internacia Jaro de Virinoj!), ĉu la viro aŭ iu(j) el la juna generacio de la familio?

Eble vi nun demandas: Kial esti membro de UEA, kiam mi jam estas membro de nia klubo, de nia enlanda fakorganizaĵo kaj de SEF? La respondo estas simpla! Kiel esperantisto vi efektive rompis la lingvajn barojn, vi liberigis vian personecon kaj tiel jam transiras ĉiujn landlimojn. Vi dank' al Esperanto estas sur bona vojo al plenrajta mondciivitaneco! Pripensu tion, ĝoju pro tio kaj ĝuu la atingitan liberecon. Montru tion per solidareco al la hejma klubo, al la hejmlanda Asocio sed, antaŭ ĉio al la tutmonda organizaĵo UEA!

Jes, vi diras, sed estas multekosta afero, ĉu ne? Kalkulu mem, vi insistas: 80 skr, poste kvardek kaj... Mi respondas: 80 skr signifas 6:67 skr/monate aŭ 0:22 skr/tage? Ĉu vi povas oferi tiun sumon? Memoru, ke UEA — nia komuna internacia organizaĵo — meritis vian apogon! Ankoraŭ unu, kiu fariĝos tre ĝoja pro via decido, estas nia ĉarma kotizperantino, s-ino Ester Andrén en Malmö. Ne estas tro malfrue aliĝi por 1975. Faru tuj!

Plenkore via
Lennart Aberg

NE-MULTEKOSTA REKLAMO

S-ro Redaktoro!

De antaŭ pluraj jaroj mi kutimas uzi la ne-multekostan eblecon diskrete sed konstante reklami por Esperanto en la telefonkatalogoj (ankaŭ en la private eldonataj) per la serĉrubriko en pli grasa stilo "Esperanto — UEA repr-ant Karl Gustafsson ktp". Estas tamen rimarkinde, ke oni preskaŭ neniam trovas tiun modestan sed tamen tute ne senefikan metodon pli ofte aplikata. En la oficiala katalogparto de Gävle (kiu ampleksas la tutan gubernion Gävleborg) mi certe estas la sola UEA-delegito, kiu atentigas la telefonpublikon pri sia ekzisto kaj pri la ekzisto de Esperanto. Kaj tamen mi scias, ke troviĝas UEA-delegitoj almenaŭ en la gubernia ĉefurbo.

Kia estas la stato en aliaj partoj de la lando, estas por mi neklare, sed unu afero staras ekster ia dubo: la ĉeesto de la vorto "Esperanto" en la telefonkatalogoj de la distrikto certe motivigis lernejan rektoron inviti min viziti lian lernejon por informi entute ĉ. 600 gelernantojn dum tri matenaj asembleoj de po 20 minutoj pri nia lingvo kaj la ideo kiu portas ĝin. Mi estas tute konvinkita, ke ĝuste la rubriketo en la koncerna katalogo donis al li la ideon sonorigi al mi por demandi, ĉu mi havus intereson doni al lia lernantaro la diritajn informojn. Tio estas signo, ke la diskreta reklamo estas rimarkata, kaj ĉu ne valorus sekvi la ekzemplon?

Karl Gustafsson

MIGRADO ĈIRKAŬ LA MONDO

La sveda familio Gunnie, Gunnar kaj Kim Mällberg, kiu la 15an de jan. 1974 startis de suda Svedujo por migri ĉirkaŭ la mondo nun iras puŝante siajn peze ŝarĝitajn ĉarojn laŭ la suda bordo de Hispanujo.

Dum la jaro ili sendis 50 "semajno-raportojn" al abonantoj de iliaj leteroj. La familio, kiu estas amikoj kaj subtenantoj de Esperanto, promesis lerni la lingvon kaj ankaŭ en siaj leteroj skribi mallongajn resumojn en esperanto. Pro malgranda nombro de esperantistaj abonantoj la resumoj ĝis nun fariĝis tre mallongaj kaj bedaŭrinde kun lingvaj eraroj. Pli multaj esperantistaj abonantoj de la filateliste afrankitaj leteroj instigus al la familio pli rapide lerni kaj uzi la lingvon. La leteroj estas svedlingvaj kun esperantoresumoj mallongaj, krom tio ankaŭ resume en la angla lingvo.

La familio Mällberg estas vegetaranoj kaj en siaj leteroj Gunnar skribas pri vegetaraj manĝoj kaj vegetara vivo. Ili estas naturamikoj kaj pritraktas temojn pri nuna medio, naturo, bestoj, birdoj, floroj, antikvaĵoj, grotoj k. t. p.

Ilia migrado daŭros ankoraŭ minimume 8 jarojn ĉirkaŭ la mondo. Oni povas aliĝi nun. La kosto por aliĝo estas 75 svedaj kronoj, kaj la abono kostas 300 sv. kronojn. Pojaro. La sveda poŝtĉeka konto: 43 89 48-2 K. G. Mällberg, 235 02 Vellinge Svedujo.

T. F.

RESPONDO AL S-INO SEKELJ:

En la n-ro 2/74 mi trovis leteron de s-ino Antonije Sekelj el Beograd, kiu tuŝas kelkajn erarojn, trovitajn en via revuo en geografiaj nomoj. Ĝiaj linioj malkaŝas sian neinformitecon.

Pri la formo "ĉeka" anstataŭ "ĉeĥa" mi mem jam kelkfoje protestis ĉe allandaj esperantistoj, speciale ĉe la franclingvanoj, kiuj en tiu afero imitas sian nacian lingvon. Sed unusola ĝusta formo povas esti nuntempe nur "ĉeĥo, ĉeĥa". En nia lingvo kaj en la slovaka ni klare diferencas inter h kaj ĥ (skribata ch), ĉar niaj lingvoj posedas ambaŭ sonojn. "Ĉeĥo" en nia kaj la slovaka lingvoj estas "Ĉech", legu "ĉeĥ", la lando estas "Cechy", legu "ĉeĥi", t.e. Bohemio (aŭ Ĉeĥio, Ĉeĥujo). Absolote neniu ĉeĥo kaj slovako... eble opinias, ke en esperanto simpla "h" estas muta litero!!! La ĉeĥa vorto "ĉehy" estas voko al ĉevaloj, iri maldekstren.

En iuj slavaj lingvoj la sono "h" ne ekzistas, nur la sono "ĥ", tial en ĝusta fonetika esperanta transskribo oni devas uzi "ĥ", ne nuran "h".

Mi spertis, ke poloj, rusoj kaj bulgarioj prononcas "ĥomoj ĥavas" anstataŭ "homoj havas". Kiam mi foje

unu radiostacion atentigis pri tiu misprononco, mi ricevis spritan respondon en tiu senco: "ni rajtas prononci tiel, ĉar ekzistas samideanoj, kiuj akcentas malĝuste en esperanto la unuan silabon anstataŭ la antaŭlasta". Tiel nome okazas ĉe iuj neperfekte parolantaj ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj. Do, kion fari?

Pri la strikte fonetika ortografio, pri kiu parolas s-ino Sekelj, mi havas mian dubojn, ĝi koncernu sian gepatran lingvon (kiun mi cetere ne konas), aŭ esperanton. Mi scias, ke oni ne prononcas "kvoto, akvo, sekvi", sed "kfoto, akfo, sekfi", kio cetere neniu ĝenas.

Adolf Stanura
Čkalov-str. 863/25
708 00 Ostrava-Poruba,
CSSR.

HELSINGÖR 1975

tuj antaŭ UK de Kopenhago

La internaciaj feriaj Esperanto-Kursoj okazos 20.—26. de julio en La Internacia Altlernejo de Helsingör. Ni invitas vin veni por ĉeesti — kaj ĝui neforgeseblajn tagojn en internacia rondo dum la semajno tuj antaŭ la kongreso de Kopenhago.

Programo senpage havebla ĉe

Eva Langkilde
Ingemannsvej 18
DK-3000 Helsingör
Danlando

Årsmöte

Härmed kallas andelsägarna i

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO U. P. A.

till ordinarie årsmöte

lördagen den 27 maj 1975,

kl. 18.30

på OK Motorhotell i Halmstad.

Ombud för andelsägande föreningar skall inlämna fullmakt före årsmötets början.

Ärenden enligt stadgarna § 14.

Verksamhetsberättelse med ekonomisk rapport för 1974 kommer ej att publiceras men kan efter beställning erhållas från Esperantoförlaget, Fack, 200 42 Malmö, tel. 040 - 12 20 29, onsdagar 10.00 — 11.00, torsdagar 17.00—18.00.

Styrelsen

MÖT SOMMAREN I HALMSTAD

SEF-kongressen i Halmstad


Halmstadsbygden och hela landskapet Halland har, liksom alla landskap, sin egen prägel. Det är omväxlingar i såväl natur som bebyggelse. Vi har både sandstränder och mera klippformade stränder. Tättbebyggelse i städer och samhällen. Vi har sjöar och skogar omväxlande med åkerbruksbygder. Vi har också industrier av olika inriktning och storlek. Och rikligt med fritidsstugor vid hav och sjöar samt annorstädes.

Vi trivs bra med vår "fosterjord" och vi tror även andra gör det, vilket f. ö. somrarnas stora "badinvasioner" visar. Det är vår förhoppning att vädret skall gynna naturens växtlighet, så att de vackraste dragen i hallandsnaturen framträder som en inbjudande välkomsthälsning till SEF:s 69:e årskongress under pingsthelgen den 17—19 maj 1975. Beträffande rent praktiska åtgärder vill vi nämna:

- 1) Sista anmälningsdag är 1 maj
- 2) Hotellet har egen fri parkering, men garage saknas
- 3) Postadressen är: Svenska Esperantokongressen 1975, Halmstad
- 4) Postgironummer: 28 87 75-3
- 5) Gatadress: OK Motor Hotell, Strandvallen 5, Vallås, Halmstad (Hotellet är väl synligt från Växjövägen — väg 25)
- 6) Övriga upplysningar lämnas av LJK Gunnar Tengling, ordförande, Knut Peters väg 26, 302 41 Halmstad, tel. 035 - 357 47.
Tage R. Olsson, sekreterare, Vitabandsvägen 13, 302 40 Halmstad, tel. 035 - 359 87.
Sven Berlin, kassör, Österängsgatan 4, 302 53 Halmstad, tel. 035 - 10 22 85

DELTAGARAVGIFTER FÖR ESPERANTOKONGRESSEN 1975

Paketpris i enkelrum, ej SEJU-medlem	255:—
Paketpris i dubbelrum, ej SEJU-medlem	235:—
Paketpriset innefattar kongressavgift, två övernattningsar, två frukost, två lunch, bankett, utflykt med kaffe samt thesupé	
Paketpris i gruppförläggning, SEJU-medlem	140:—
För deltagare i enstaka arrangemang:	
Kongressavgift (obligatorisk), ej SEJU-medlem	25:—
Kongressavgift (obligatorisk), SEJU-medlem	10:—
Enkelrum per person och natt	50:—
Dubbelrum per person o. natt	40:—
Frukost	6:—
Lunch	23:—
Bankett, pingstafton	48:—
Utflykt med kaffe	17:—
Thesupé	18:—



Programo de la 69a jarkunveno de SEF, Halmstad

PENTEKOSTA VESPERO, SABATE, 17 MAJO

- 14.00 Estrarkunsido de la INSTRUISTA LIGO
- 15.00 Malfermo de la kongresa oficejo
- 16.00 Estrarkunsidoj de SEF kaj SEJU
- 17.00 Solena malfermo de la jarkongreso
- 18.30 Jarkunsido de Eldona Societo Esperanto
- 20.00 Bankedo. Salutoj al la kongreso. Muziko. Dancado

PENTEKOSTA TAGO, DIMANĈO 18 MAJO

- 07.30—08.30 Matenmanĝo
- 09.00 Jarkunsido de SEF
- 12.15 Lunĉo
- 13.30 Fakaj kunsidoj
- 14.00 Aŭtobusoj startos por ekskurso
- 16.00 Kaftrinkado en Tylöhushaus
- 16.40 La aŭtobusoj reiros al OK hotelo
- 18.00 Diservo en la novkonstruita preĝejo de Vallås
Predikos: Paroĝestro Gunnar Edberg
- 19.30 Supeo — muziko kaj kantado
- 20.30 Diskuto: "La virino en la esperantista literaturo"

DUA PENTEKOSTA TAGO LUNDE 19 MAJO

- 07.30—08.30 Matenmanĝo
- 09.00 Diskuto: "Kiel oni akiras membrojn kaj konservas ilin"
- 12.00 Gis revida lunĉo
- 13.30 Fermo de la kongreso

Vackert BREVMA'RKE KÖPENHAMN

Hjälp till att göra reklam för världskongressen i Köpenhamn genom att på all post sätta kongressens vackra brevmarke. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:50
3 kartor kr. 3:25

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö).

Aligiloj kan samtidigt beställas på giroalongen, om man så önskar.

Optika telegrafo

En ĉiu civilizacio de homoj ekzistis specialaj rimedoj por transdono de informoj. Ekzemple, antikvaj ĉinoj, grekoj kaj romanoj informadis pri la plej gravaj okazintaĵoj per optika maniero, signante per brulantaj torĉoj el specialaj turoj. Estas atesoj, ke dum la Troja milito la informoj estis sendataj proksimume je distanco de 540 kilometroj. Simile estis transdonataj la sciigoj ankaŭ en Grekio dum la Peloponesa milito.

Oni provis transdoni informojn je grandaj distancoj ankaŭ per akustika maniero.

La antikvaj litovoj uzis la optikan manieron por transdoni sciigojn. Bruligante fajron sur la kastelturoj aŭ sur la altaj montoj, ili sciigadis al la najbaroj pri invado de germanaj krucmilitistoj en la litovan landon. Ŝanĝante la densecon kaj nuancon de la fumo, la litovoj kapablis sciigi pri la direkto de l'invado kaj pri la nombro de la malamikoj.

Pli bona perfektigo en la sfero de transdono de sciigoj ne estis farita preskaŭ ĝis la XVIII. jarcento, kiam la komerco komencis rapide evolui.

La franca inĝeniero Claud Chiappe (Klod Ŝap) por transdoni informojn konstruis instrumenton, nun nomatan optika telegrafo. Ĉi tiu aranĝaĵo memorigas pri nuntempa televida anteno lokita sur longa masto. La strukturo de l'optika telegrafo de Klod Ŝap estis moviganta transverso, ĉe kies finoj estis faritaj pli mallongaj, same movigantaj liniiloj. Ĉi tiuj tri movigantaj partoj estis diverse reciproke movataj per ŝnuroj. Tiamaniere oni povis fari 76 diversajn kombinojn, kiuj signifis literojn, ciferojn kaj distigajn signojn. La nuna linio de l'optika telegrafo estis konstruita en Francio en la jaro 1794 sur distanco de 225 kilometroj.

La telegrafo de Klodo Ŝap tre vastiĝis en Eŭropo. En 1795 ĝi estis instalita en Svedio, en 1802 — en Danlando, en 1833 — en Prusio, en 1834 — en Aŭstrio.

En Rusio la unua linio de optika telegrafo estis farita en j. 1834 inter Peterburgo kaj Kronŝtato. Post 5 jaroj linio de optika telegrafo estis farita inter Petrogrado kaj Varsovio. Tio estis la plej longa linio de optika telegrafo en la tuta mondo. Ĝi estis 1200 km longa. La tuta linio havis 149 staciojn. Telegramo de 1000 signoj estis transdonata el Peterburgo al Varsovio dum 35 minutoj.

Linio de optika telegrafo longa pli ol 430 kilometrojn pasis ankaŭ sur la litova teritorio. La optika telegrafo

tiam helpis en Vilnius konservi de ruiniĝo la Gediminas-kastelon, tiel karan por la koro de ĉiu litovo. Konstruante linion de optika telegrafo sur la restaĵoj de la turo de l'kastelo, oni surkonstruis duetaĝan lignan konstruaĵon, en kiu estis instalita telegrafa stacio. Ĉi tiu konstruaĵo savos la kastelon de ruiniĝo.

La linioj de optika telegrafo en Rusio funkciis 15 jarojn. Dum tiu tempo estis telegrafe senditaj kaj ricevataj multe da gravaj sciigoj de Peterburgo al Varsovio kaj de tie, trans Aŭstrio kaj Prusio, al aliaj okcidenteŭropaj landoj. Sed la tuja komunikado per tiu telegrafo tre dependis de l'atmosferaj kapricoj. En nebulo aŭ humido, kiuj ja ofte okazas en nia lando, ĉi tiu telegrafo ĉesis funkcii eĉ por pli longa tempo.

En la komenco de la XIX-a jarcento estis faritaj la unuaj provoj transdoni sciigojn, uzante elektromagnetajn apearojn. La unuan elektromagnetan telegrafon eltrovis en 1832 la rusa sciencisto P. Ŝiling (1769—1837). Ekde tiu jaro komenciĝis la erao de elektromagneta telegrafo, ekzistanta ĝis nun.

El la litova lingvo kun malongigoj

trad. J. Pipiras

(El INTERLIGILO,
organo de IPTEA)

Kelkaj vortoj pri vizito en Italio

Kiel oni mallonge rakontu pri 15-taga restado en Italio, plena de travivaĵoj? Kompreneble detale ne eblas, mi devos "forgesi" multajn menciindajn aferojn. Jen, tamen mia rakonto.

Post tri belaj tagoj ĉe Lago de Garda mi venis al Verona por partopreni la italan esperantokongreson. Estis kvazaŭ UEA-kongreso en miniaturo. (Nur ne lingve, ĉar fakte estis malfacile por eksterlandano sekvi la debatojn). Ĉe la inaŭguro ĉeestis tuta aro da imponaj personoj, parlamentano, urbaj aŭtoritatoj, sindikataj gvidantoj k. t. p. Ili havis aron da fakkunsidoj, interkona vespero, internacia vespero, prezentado de teatra grupo kaj kanto de ŝoro, prelegoj i. a. de prof. István Szerdahelyi el Budapeŝto kaj prof. Silvio Ceccato el Milano, dancvespero kaj finfine tuttaga ekskurso. Estis esperantaj diservoj, unu el tiuj estis por la esperantistoj mortintaj dum la jaro. Ankaŭ estis aranĝata gruplaboro, du grupoj gvidataj de d-ro Corsetti kaj prof. Nicola Minnaja sin dediĉis

al la temoj "Lingvo-instruado kaj interlerneja korespondado kiel integrigaj aktivecoj en plentempa lernejo" kaj "Esperantista gazetaro en Italio".

Partoprenis c. 400 personojn, el kiuj rimarkinde multaj gejunuloj. Ĉeestis eksterlandanoj el 16 landoj.

Unu vesperon mi faris viziton al nova "Esperantujo", kiun volas krei Giorgio Vandelli. Li aĉetis malnovan domon en la proksimeco de Verona kaj mem komencis restaŭri ĝin. Li provis interesi la italan federacion por la ideo por ricevi ekonomian helpon, sed ne sukcesis konvinki ilin. Estas malfacile juĝi, ĉu la projekto estos sukcesa, sed li faris grandegan laboron por igi la lokon alloga, kaj ekstere kaj interne. Mi povas diri, ke mi kredas je la ideo, ĉar li mem faras la laboron, ne nur projektas. Do, se vi en la esperantaj gazetoj vidis anoncojn pri la nova Esperantujo, ne forgesu viziti ĝin, la loko indas viziton.

En Verona mi renkontis miajn gemikojn Natalia kaj Mario Giani el Grosseto, kiuj jam antaŭe invitis min pasigi semajnon en ilia hejmo. Dum tiu semajno mi havis okazon viziti multajn lokojn ĉirkaŭ Grosseto, i. a. Florenco kaj Romo. Multaj impresoj restas; la italaj urboj kaj vilaĝoj estas tute aliaj ol niaj, estas malfacile nun elekti ion speciale. Por mi tamen la renkonto kun la familio Giani kaj la aliaj esperantistoj en Grosseto restas la plej grava. Ĝi donis al mi neforgeseblan senton da varmo kaj vera amikeco, kiu povas ĝermi dank' al esperanto.

En Grosseto mi do havis eblecon renkonti kelkajn esperantistojn, i. a. mi vizitis studrondon kun instruistinoj, kiuj intencas poste instrui esperanton en siaj lernejoj. De Vittorio Orlandini mi ricevis proponon, ke ni aranĝu ŝanĝon de vizitoj en Gotenburgo kaj Grosseto. Por havi grupon ni povus inviti ankaŭ neesperantistojn. Ni restu ekz. 10 tagojn kaj dum tiu tempo ni faru ekskursojn kaj konatigu unu la alian. Ni provu aranĝi malmultekostan restadon kaj cetere provu doni al la partoprenantoj alispecan travivaĵon ol oni povas havi per ordinara libertempera vojaĝo. Estus interese scii, ĉu ekzistas intereso por simila vojaĝo. Kompreneble povos partopreni ankaŭ personoj el aliaj lokoj en Svedujo. Respondu tuj, ĉar la grupo en Grosseto atendas respondon por allogi partoprenantojn al sia studrondo. Mi povas promesi, ke vi ricevos memorindan vojaĝon ĉar persona kontakto ĉiam donas apartan valoron al vojaĝo. Dato estas malfacile fiksi, sed ni menciis majo aŭ septembro. Mi estas preta ellabori pli konkretan planon kaj mi ankaŭ intencas sendi al Grosseto proponon pri vidindaj aferoj ĉi tie. Ĉu eble io por la studrondoj, tuja persona kontakto kun eksterlandaj esperantistoj.

Mia telefona numero estas 031/57 11 33.

Märtha

SPRÅKET OCH VI

PLOCK UR SVENSK PRESS

ENGELSKA TALAS I ENGLAND

Varje invandrare i Sverige har nu laglig rätt till omkring 200 timmars fri undervisning i svenska på betald arbetstid. Men vi skall nog inte vänta oss alltför dramatiska resultat av denna satsning. Det är svårt att lära sig ett språk, om man inte växer upp med det som barn. Med mer än tre gånger så stor undervisningsvolym i engelska har majoriteten av våra grundskoleelever inte så alldeles lätt att klara sig på egen hand i England.

Alvar Ellegård i DN 9 jan. 1975

SVAR SVENSKA

Det tråkiga är att vi själva ofta försöker tala eller skriva på samma sätt som vi tror att myndigheter eller människor i hög position uttrycker sig.

När vi försöker blir det ofta fel. Ett par exempel som rör skadeanmälan till ett försäkringsbolag:

"Längderna är endast approximativa, enär konstapeln, om han än lånade mig ett måttband, vägrade att hålla i andra ändan."

"Jag sammanstötte med ett stationärt träd."

Eller så vågar vi inte försöka utan håller tyst i stället. Låginkomstutredningen visade bl. a. att 90 procent av alla svenskar inte kan avfatta en skrivelse till en myndighet.

Intervju med Åsa Sahlquist, Aftonbladet 6 jan. 1975

SPRÅKKUNSKAP I SVENSKA

Att läsa en text full av språkfel väcker obehag, precis som att prata med en utlänning som fumlade med orden, som att ha att göra med en handikappad — man blir generad, man skruvar sig och vet inte om man ska ingripa och hjälpa eller om det bara skulle uppfattas som kränkande.

Hörnartikel DN 6 febr. 1975

DANSKA ÄR PROBLEM

Enbart i Malmö har skolorna i dag 500 danska elever och det finns en god uppsättning lärare, men, sa Lars Kjellman, vi vet ännu inte vad som ska hända. Vi har för liten erfarenhet. Vi sätter in lärare för svenskundervisning men eleverna måste i första hand lära sig sitt "eget språk" också för att kunna lära sig ett nytt.

Arbetet 9 febr. 1975

MEN SA FRANSKA ARBETARE DETSAMMA?

På verkstadsgolvet är entusiasmen något svalare över att Volvo infört engelska som concernspråk. Bengt Ekeblad, verkstadsklubbens ordförande: "Vad händer den dag vi får en utlänning i styrelsen — en oljeschejk eller så? Då blir det engelska och det blir svårt för våra representanter i styrelsen att hänga med. Det är i varje fall tur att concernspråket inte blev franska, vilket var på tal för några år sedan. Då hade vi varit helt ställda."

Veckans affärer, 9 jan. 1975

JUDAR I SOVJET

Inte ens i det avlägsna Berobijan, som anvisats sovjetjudarna som nationellt och självstyrande område, får judarna ha sitt eget språk.

DN 14 febr. 1975

WALES I RADION

Det engelska språket kröp in över gränserna när walesarna började besöka marknaderna i de engelska grannbyarna.

Bondesamhället bröt samman när industrialismen kom. Men tvärt emot vad man förmodat räddades cymriskan av industrialismen. Språket tvingades nämligen att anpassa sig till den nya tekniska tillvaron. Fackföreningar och politiska sammanslutningar sköttes på cymrisk. Skolan var inte effektivare än att skolbarnen kunde behålla sitt cymrisk modersmål.

Referat av radioprogram, DN 11 febr. 1975

SPRAKBYTTE I RYMDEN

De amerikanska och sovjetiska rymdmännen kommer att byta språk och menyer under den första gemensamma rymdflygningen i juli. "Under flygningen kommer den sovjetiska besättningen att tala engelska och den amerikanska ryska. Det är lättare att förstå varandra eftersom personer som talar ett främmande språk talar långsamt och tydligt."

DN 7 jan. 1975

VID DESPERATION: TAG DET LÄTTASTE!

Undervisningen är upplagd på samma sätt på alla hebreiska kurser i Israel. Det enda språk som tillåts är hebreiska. Och hur skulle det kunna vara annorlunda?

Här sitter Daniel och Michel och talar bara franska. Mary kommer från Egypten och talar franska och arabiska, ogärna engelska. Chaim talar spanska, franska, jiddisch och i desperata ögonblick esperanto. Julia förstår bara engelska, Joel bara ryska. Michail och Lea ryska och rumänska. Rosalie bara rumänska.

DN 23 jan. 1975

Citaten är valda av Ulla Luin, febr. 1975



Boken Du inte kan undvara

Esperanto en perspektivo innehåller esperantorörelsens hela historia, alla fakta om språket och rörelsen och om dagens situation. En unik uppslagsbok men samtidigt en spännande skildring som du läser med spänd uppmärksamhet.

Av Ivo Lapenna (chefredaktör), Ulrich Lins och Tazio Carlevaro.

Pris kronor 195: — inklusive moms och försändelsekostnader från ESPERANTOFÖRLAGET, Fack, 200 42 Malmö 7

VÄRLDS- SPRÅK

Engelska är ett världsspråk som talas över hela världen.

Franskan är ett världsspråk som talas över hela Frankrike.

Det är något märkvärdigt med franskan. Den som talar holländska, portugisiska, tyska eller swahili, kan möjligen få en eller annan förströdd komplimang. ("Lite onödigt naturligtvis, att han talar holländska, men det sitter ju inte i vägen").

Men den som talar franska, den anses som någonting alldeles extra. Att kunna franska tyder inte bara på en enorm språkbegåvning, utan också att man har en djup och varaktig Bildning.

Fransktalaren blir en auktoritet inte bara inom sitt eget ämnesområde — t. ex. arkeologi — utan också i fråga om konst, litteratur, musik, teater, mat, politik och trädgårdsmöbler.

Ännu i våra dagar är franskan således snobbspråket framför andra.

Den enkla sanningen är annars att franskan talas av en obetydlig minoritet här i världen. Av de stora världsspråken lär franskan i själva verket komma som nummer 12. Ett stycke efter portugisiskan.

Då och då ser man i tidningarna inlägg av typen: varför inte standardisera språken — varför inte skapa ett enda, gemensamt världsspråk?

Inom ett speciellt område har detta i praktiken genomförts: maten. Varje kommunhotell med självvaktning — vare sig det ligger i Värmland eller Afghanistan — har numera matsedeln skriven på franska.

Ingenting förstär vi av vad som står på matsedeln, men vi har lärt oss en enkel tumregel: soppor och fisken står först. Därför fingrar vi ett stycke ner på matsedeln och gissar att det här måste nog vara kött.

Det brukar fungera, utom när det är Fiskens Vecka.

Men någon gång kan man ju äta fisk också. I vårt land har man dessutom standardiserat det därhän att snart sagt varje köttbit — och många fläskbitar med, för den delen — kallas entrecote.

En god vän till oss har en annan liten god regel. Allting som börjar på 'p' och 'a' innehåller vitlök, påstår han. Det kanske är sant.

Men på franska står det. Vilken dag som helst kan vi alltså vänta oss att se Janssons frestelse presenterad som "La temptation de Monsieur Jansson". Det är standard det.

Men också fransmännen har sina problem. Vi talar i Sverige om "svengelska" termer av typen weekend, container, hit och bias. På franska heter det mycket riktigt Le Weekend, Le Hit, och — allra bäst — "Le Do-It-Yourself".

Det är franska det.

Men allvarligt talat. När vi talar om ett enda världsspråk, menar vi i regel inte ett språk som skall ersätta alla andra. Vi menar snarare ett språk som skall användas i alla internationella sammanhang.

Eller vill ni tala engelska också vid frukostbordet? Eller kanske franska?

Och när ni går på fotboll, så får ni inte skrika "heja grabbar friskt humör, det är det som susen gör" utan något liknande på engelska. Eller ryska.

Nu undrar vi bara vad "susen gör" kan heta på engelska.

Nej vi behöver snarare ett språk i internationella kontakter. Funnes det ett sådant, kunde vi inskränka oss till att lära oss vårt eget modersmål (hjälpigt) och ett språk till.

Vi minns med glädje ett ISO-sammanträde i Stockholm för några år sedan, då den ryska delegationen (som bara talade ryska) drack kaffe tillsammans med den franska delegationen (som bara talade franska) och den engelska delegationen (som bara talade engelska).

Det var en liten teknisk detalj som ryssarna ville klara ut, och tolken fanns inte i närheten. Fransmän och engelsmän gjorde sitt yttersta för att förstå. Ryssen ville mena att man på något sätt skulle koncentrera diskussionen kring något — men vad, det kunde ingen förstå.

Till sist sa en av ryssarna trevande:

— Design.

— Aoui, sa fransmännen med ett stort leende, design. Ouiouioui.

— Of course, design, sa engelsmännen. We understand.

I det ögonblicket skapades vänner för livet.

Någon tid senare fick vi ett cirkulär från ett antal språkvårdare som ville ta bort en del "rysliga" ord ur det svenska språket. Ett av dessa ord var — naturligtvis — det alldeles särskilt rysliga ordet "design". Det borde, sa man, heta formgivning i stället.

Standardisering är svårt.

B. N.

Esperanto- glimtar

Aniara av Harry Martinsson dök upp i flera notiser, när en ansökan om bidrag för översättning till esperanto kommit in till utbildningsdepartementet. Bland annat meddelade DN att "Esperantoförbundet vill ha 25 000 kr av regeringen för att ge ut Harry Martinsons Aniara på esperanto."

Tidningen Sökaren intervjuar om esperanto: "Vi esperantister vill, säger Franko Luin, att det skall finnas ett internationellt språk som alla kan tala och skriva: ett språk som är lätt att handskas med vid sidan av modersmålet och som obligatoriskt lärs ut i alla skolor."

Gott minne tycker Västmanlands Läns Tidningar att Tiberio Morariu har, när han återser en elev efter 47 år: "En glad överraskning väntade föredragshållaren efter föredraget, då en av besökarna, fru Ingrid Szymczak, kom fram och hälsade och talade om, att hon som liten flicka hade varit med i den allra första kurs i esperanto, som red. Morariu hade hållit när han kom till Sverige 1928! Han kom genast ihåg henne och det blev ett glatt återseende!"

Karl-Arne Holmsten spelade i ett teaterstycke på esperanto för 40 år sedan, berättar Svenska Dagbladet: "Karl-Arne Holmsten har varit med i teaterkarusellen i över fyrtio år. Det började med Molière och Strindberg på esperanto på Oscars. Förklaringen till att pjäserna spelades på detta världsomspännande språk var en esperantokongress som hölls i Stockholm. Fyra dagar före premiären blev Karl-Arne Holmsten tillfrågad om han kunde hoppa in för en annan som omöjligt kunnat lära sig språket."

"Ska esperanto bli det sammanhållande språket för de socialistiska partierna i världen?" frågar Östra Småland, samma fråga tas upp i Nerikes Allehanda och Västerbottens Folkblad. NA talar om att "viid hallsbergsföreningens januarimöte framhölls att flera broderpartier till det italienska partiet har uttalat sig positivt till förslaget." I Västerbottens Folkblad intervjuas Ivar Nilsson, som dessutom pratar om esperanto helt allmänt: "Tänk er en stor världskongress. Deltagare från 50-talet länder. Men bara ett språk och inte en enda tolk."

Ulla Luin

Jubileaj pensetoj



Mi mem forgesis, ke mi jubileas, ĝis mi ricevis la amuzan, karesan artikolon de la mistera Io Iu sur via 59-a paĝo. Tiom da vortludoj! kaj tiaj! li eble meritas punon pro per-versa aŭ almenaŭ perproza, perpleks-pervorto, ĉu ne?

Por mi, la portreto verkita per sinjoro Iu (aŭ, se li estas vere ĉino, eble s-ro Io; li ne kulpigu miajn miaŭojn se li tiel iais...) jam ŝajnas, kiel la fotoportreto el 1956, strange eksdata. Mortis la miaŭa moŝto Montevideo. Mortis mia bona patrino post kvin jaroj sen normala menso. (Ne, mi ne flegis ŝin, nur pagis flegejon kaj diversmaniere prizorgis ŝin.) Finiĝis mia profesia kariero sufiĉe sufero post 24 jaroj; sed mi devus servi 30 jarojn por rajtigi min al profesia pensio.

Preskaŭ mia tuta verkaro ĝisnuna ŝajnas al mi, fakte, strange fremda kaj nematura, kvankam mi plej alte estimas mian longan poemon **Eroj**. Ĉio estis sincera kiam mi verkis ĝin. Ĉiam mi estis serioza kaj sincera artisto, sed nur, ho ve, laŭ miaj ebloj. Sed mi ne povas tre interesiĝi pri la verkoj verkita; gravas por mi nur la verkoj verkotaj.

Ekde 1970 mi devis tre rekonstrui mian vivon. Nun mi faris miajn novajn decidojn. Mia estonta vivo kredeble estos malriĉa; mi sufiĉe timas maljunaĝon; despli pro inflacia epidemio kaj sociaj nestabilaĵoj — sed, devige forkurinte el la kolosaj kaj konstantaj malsinceraĵoj, kiujn mia pedagogia profesio, en la nuna epoko devigis al mi (nu, ne necese al ĉiuj!) mi fakte sentas min pli feliĉa, ol iam ajn kiam mi havis pli altan enspezon. Vivo longe tordita iasence nun povas kreski pli rekte.

Mi nuntempe finas doktoran disertacion pri angla romantisto, Charles Reade (1814—1884). Esperantistoj, ink. Henry Rydberg el Skövde, multe helpis min pri kelkaj esploroj por tiu laboro. Mi reekstudis pro sciamo, sen karieraj esperoj. Mi penos daŭre iel subteni min per anglalingva verkado, ekzamenaj laboroj, kaj similaj sporadaj laboroj. Mi havas almenaŭ multajn projektojn. Mi loĝas en propra dometo en laborista kvartalo en mia ege amata Oxford. Laboras ofte peze en mia ĝardeneto, kie mi kreskigas multajn legomojn kaj fruktojn. Ne sufiĉe ofte aŭ bone purigas la hejmon, pro tiom da intelekta laboro; tamen planas humuran esperantan poemaron pri "Hejmo kaj Ĝardeno". (Eposeto pri gasforno aperos en **Mon-da Karuselo**.)

Jen, do, mia bona Io Iu Ia, via Direktorino, dank' al Di' — rekte vivas finfine, kvankam sen multa ordo, en Oks-fordo. Se mi vivos sufiĉe longe sen ia katastrofo, mi vere esperas, ke mi verkos ion pli valoran, ol miaj ĝisnunaj provoj.

Angle? — jes. Se mi penos vivi per mia plumo, mi vere devos verki angle! Esperanta verkado nur malprofitigas; la verkistoj pagas papecon, afrankon, tempon, sed ne ricevas pagon. (Jes, mi komprenas, ke nuntempe oni ne povas pagi esperantajn verkistojn; Esperanto postulas oferojn de ni ĉiuj; tamen ankaŭ verkistoj havas stomakojn, kaj mi, avidan.)

Sed esperante, ĉu esperante? Jes, kompreneble. Mi ne povas profeti, sed mi sincere deziras, esperas, kaj preskaŭ kredas, ke mi povos krei kelkajn maturajn esperantajn verkojn, kiuj superos miajn fruajn. Tion mi tre deziras fari; precipe poemojn, kies intelekta enhavo estu pli riĉa, kiuj pli rekonos ironiojn, dubojn, komplikojn de la vivo; malpli elversitajn, pli artefaritajn.

Relative malriĉa kaj multe pli libera ol iam, mi mem esperas, ke antaŭ mia morto mi kontribuos ion pli al mia esperanta kaj mia angla verkaro. Dum mi daŭre povos verki, mi esperos. Kaj mia dometo estas ornamita per multaj memoraĵoj el aliaj landoj. Mia animo, same.

Kaj mi akiris, post tui fotoĵoj de 1956, ne nur dometon, ĝardeneton, kaj eble 12 pluajn superflujajn kilogramojn, sed 8 superkurajn piedetojn; tigrostriano (aŭ linkomaskan) siaman katidon, tre proletan tigrostriano katidon. Oliver Digby Barrington Fairweather havas imponan registritan genealogion; Catley Bodkin certe havas genealogion, sed nenie notitan. Ili vivas kun mi, en senklasa socio, en sankta harmonio, kun komuna lingvo interkata (ankaŭ ĉiu sur neŭtra-la fundamento...) kaj ĉiutage sanigas min per multaj ridoj.

Ili estas multe pli junaj kaj viglaj ol mi, do eble ili iam verkos ion por **La Espero**, se mi povos traduki por ili

Marjorie Boulton
Februaro 1975

Letero al fraulineto post ŝia vizito en Svedlando

Kara Maria!

Mi dankas pro letero sed malĝojigis kiam mi legis ke tiu ĉi letero estas la lasta. Esperas ke vi ŝanĝis sintenon tri aŭ kvar tagojn post via skribado — — —

Pri via demando, "ĉu mia ĉambro estas en ordo", mi volas respondi per "pentraĵo". Senhonte mi pruntas manieron kaj ideojn de la rus-juda pentristo Marc Chagall. Sed, mi ne lerte povas movi la penikon, do, mi devas pentri per vortoj — — —

Jen, ni malfermas la pordon, je la maldekstra flanko staras la ruĝa ŝranko kiel vi memoras, sur ĝi du librobretoj kun interalie libroj de rusaj verkistoj: Babel, Tjeckhov, Gogol kaj aliaj. Sur la meza pordeto de la ŝranko pendas mapo, ĝi montras Vjetnamion. Johano kaj Karlo interŝanĝis meblojn, kaj nun la granda skribtablo staras tie kun unu gablo al la dekstra muro, kaj la alia en la mezo de la ĉambro.

Karlo sidas ĉe la tablo, li skribas per skribmaŝino. Li skribas pri la vivo, kiel li vidis ĝin. Ĉirkaŭ kaj malantaŭ li estas, iomete videblaj, personoj kiujn li renkontis dum sia marista vivo: Maljunulo el Callao kun kabaneto de kartono, ho! li ne plu vivas, ĉar oni trovis lin morta post malvarma nokto, Negroj el Detroit kiuj volas pugne bati lin, aŭ mizera knabo el Port Swettenham (Malaysia) kiu gaje deklaris, ke li povas kaiku-li ĝis dudek svedlingve. Krom tio ankaŭ estas nubo de tabakfumo.

La litojn vi povas vidi dekstre ĉe la pordo. Por kompletigi la bildon mi pentras vin ŝvebantane proksime de la pordo iomete dekstre sub la plafono. Kun malapropa mieno vi rigardas al Karlo kaj al la maltrankviliga vidaĵo ĉirkaŭ li. Vi estas en nokta vestaĵo kun mallongaj kalsonetoj, kaj vi aspektas bele. Al via vizaĝo mi aldonas icmete da flav-verda koloro, nur iomete, eble vi ne fartas tute bone pro la tabakfumo. La koloro ankaŭ konvenas, ĉar vi nur ĉe estas kiel spirita estaĵo, la korpo restas en Pollando, tie vi estas tre okupita.

La bildo nun estas preta, bonvolu akcepti ĝin — — —

Kun salutoj

Duro

Ni legis

POLLANDO, NOMBROJ KAJ FAKTOJ

107 paĝojn, komforta poŝformato. Kun bildoj, kelkaj koloraj. Senpage havebla ĉe POLA RADIO, Esperanto-Redakcio, Poŝtfako 46, 00-950 WAR-SZAWA, Pollando.

APERIS MONUMENTA VERKO PRI ESPERANTO

Antaŭ mallonga tempo ni ricevis de UEA la libron "Esperanto en perspektivo", kun la subrubriko "Faktoj kaj analizoj pri la internacia lingvo". Ĉefredaktoro estas profesoro Ivo Lapenna, kiu ankaŭ verkis la ĉefajn partojn, kaj kunredaktoro Ulrich Lins kaj Tazio Carlevaro.

La libro ampleksas 876 paĝojn, estas bele presita sur bonkvalita papero kaj forte bindita. La Espero aperigos pli malfrue dum tiu ĉi jaro pli kompletan recenzon, sed jam nun ni volas atentigi niajn legantojn, ke aperis verko absolute unika inter niaj eldonaĵoj. Ĝi estas kaj iaspeca enciklopedio, kie oni trovas ĉiujn faktojn pri la internacia lingvo, kaj verko, kiun oni povas tralegi kun plezuro kaj streĉa atento.

En ĝi vi trovas la tutan historion de la esperantomovado, inkluzive tiun de fakaj organizaĵoj kiel ekzemple SAT, vi trovas science fidadajn informojn pri la hodiaŭa situacio, vi trovas ĉiujn faktojn kiujn vi bezonas, se vi volas informi pri esperanto al eksteruloj.

La verkego certe valoras la prezon, 195: — sv. kronojn inkl. imposton kaj sendkostojn. Tiun libron nepre devas havigi unuavice ĉiu klubo aŭ grupo, duavice ĉiu esperantisto, kiu deziras efektive labori por nia lingvo.

Mendu ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö.

A. B.


SENSACIO EN LA RUMANA ESPERANTO-MOVADO

Je nia granda surprizo ni ricevis el Rumanio 184-paĝan libregon verkitan de S-ro Nicolae V. Bulencea kun la titolo "ESPERANTO-limba internaciana" (Esp.-lingvo inernacia) k. subtitolo "Studiu analitic" (Analiza studo).

Pri la bone dokumentita k. elegante presita verko ni revenos kun recenzo en nia proksima n-ro.

T. M.

NORDA SENTO



*Ĉu ekzistas plia puno
ol foresto de la suno
dum tagmeza horo?
Kun la lasta radiero
malaperas vivespero,
gajo flugas for.*

*Sed alvenas jam vespero
nun kun sia arke' mistero
brilas norda lum'!
Ĉe ferŝtona mont' Kiruna,
arbarrando grizebruna,
dancas ora zum'.*

*Plumbopeze premas sento
de malfrua, vana pento:
flugis for somer'.
Fortoniĝis multaj farboj,
senfolie staras arboj,
frostas nuda ter'.*

*Plenumiĝas kora preĝo:
ŝirmodone falas neĝo,
blankas la natur'.
Milkolore nordlum'brilas,
sur pinarba pinto trilas
vintra trubadur'.*

Tiberio Morariu

NOVA SERIO DA LIBROJ POR GEKNABOJ

SAVO EL LA NEĜO de P. Korte

Facila libro por grandaj geknaboj. Streĉa enhavo pri travivaĵoj de junulo dum flugakcidento en la francaj alpoj kaj lia feliĉa savo. Bonaj desegnaĵoj sur ĉiu paĝo. Prezo kun moms 11: 25.

LA MORSO — KLUBO de R. Fisker

Sperta dana verkisto skribis tiun ĉi libron por mezgrandaj geknaboj pri kontakto pere de Morso inter du knaboj, kaj pri aventura okazintaĵo dum nokta signalado... La lastaj paĝoj de la eta libro enhavas alian interesan rakonton: "Trezo-ro-serĉado." Desegnaĵoj sur la paĝoj. Prezo kun moms 4: 55.

ELSE KAJ BO de R. Christophersen

Ĝarma libro por malpli grandaj geknaboj, ankaŭ tiu ĉi kun tre allogaj ilustraĵoj — desegnaĵoj. Certe la rakonto pri la ĉiutaga vivo — vere enhavoriĉa en sia trankvileco — pri Else kaj Bo estos kara "bonan-nokton" — laŭtleĝaĵo, se la infanoj ne mem ankoraŭ povas legi libreton. Prezo kun moms 5: 80.

Ciuj tri haveblaj ĉe

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack, 200 42 Malmö 7 - Poŝtĝrokonto 578-5
SED MENDU EN BONA TEMPO!

Novajoj el la kluba vivo

BALADO PRI LUNDE

La esperantosocieto de Kramfors invitis al kunveno dum la Semajno de Internacia Amikeco. Kelkaj eksteruloj partoprenis kaj Torsten Farm kaj aliaj informis pri esperanto.

Unika programero estis balado pri la tragedio de Lunde en 1931, kiun kantis en esperanto Ake Näsholm, kiu ankaŭ verkis ĝin. En Lunde okazis en 1931 kunpuŝigo inter strikantaj laboristoj kaj soldatoj, je kiu kvin laboristoj estis mortpafitaj.

NOVA EJO EN MALMÖ

La esperantoklubo de Malmö havigis al si novan ejon en Kronetorsgatan 94. La inaŭguro okazis la 1-an de marto. Ester Andrén rakontis pri la historio de la antaŭaj ejoj kaj Einar Hansen el Kopenhago parolis pri "Diverslandaj atmosferoj" je lumbildoj.

STOCKHOLM — EROJ EL ESTO

Maloŭte alvenas al la redakcio raportoj pri la agado en nia ĉefurbo, sed regule alvenas **Estø**, la organo de Esperanto-Stockholm kun la programoj kaj de Grupo Esperantista (la SEF-klubo) kaj Laborista Esperanto-Klubo.

Ambaŭ societoj evidente kunvenas ĉiun semajnon. Ni notiis ke Salex unu vesperon parolis pri atoma energio, temo kiu ja estas tre aktuala en Svedujo. Tri studrondoj por komentantoj funkciis.

MORARIU EN LIDKÖPING KAJ GÖTEBORG

La 7-an de marto redaktoro Tiberio Morariu rakontis pri "Rumana Literatura" antaŭ grupo da esperantistoj en la urba biblioteko en Lidköping. La loka gazeto raportis pri la aranĝo.

La 9-an de marto s-ro Morariu parolis en la nova ejo de la esperantistoj en Göteborg pri sia hejmlando Rumanujo. S-ro Anjou bonvenigis kaj s-ro Ake Blomberg prezentis s-ron Morariu, kiu venis al Svedujo kiel Cseh-instruisto en la jaro 1928. Ĉirkaŭ 50 personoj partoprenis, kaj oni havis ankaŭ etan ekspozicion pri Rumanujo.

EL VASTERÅS

ni regule ricevas ĉiumonate GAZ, t. e. La VEK-a GAZeto, kiu informas pri la kunvenoj de la klubo kaj pri esperantoaranĝoj en Västerås, sed kiu ankaŭ havas interesajn kaj viglajn debatarartikolojn pri esperanto.

EL SKÖVDE

ni ricevis programfolion pri la monataj kunvenoj de la klubo. Kelkaj eroj eble povas esti sugestoj ankaŭ por

aliaj kluboj. Jen ili: Pola vespero kun bigoso (pola nacia manĝaĵo), Bengt Alsén babilas pri la romanfiguroj de Julio Baghy kaj Gunnar Mattsson legas fragmenton el la libro "Taglaboristoj" de Hans Kirk. La 24/4 oni esperas viziti iun el la skaraborgaj artistoj, eble BLA en Lerdala. Oni dissendas unu programfolion en esperanto kaj unu en la sveda lingvo.

KLUBGVIDANTOJ, KIE ESTAS VIAJ RAPORTOJ?

Laŭ peto de pluraj legantoj, prezentitaj eĉ je la jarkunvenoj de SEF, ni decidis ek de la antaŭa numero aperi ĉi-tiun kolonon kun novaĵoj el la kluba vivo. Kiel vi facile povas konstati ĉi-supre ni ne ricevis iujn raportojn el la kluboj kaj grupoj. Ni devis mem kompili la kronikon el diversaj informiloj kaj cirkuleroj. Unue, tio fakte ne estis la intenco, due tio signifas, ke ni povas informi nur pri tiuj societoj, kiuj sendas al ni tiajn informilojn.

Ni surpriziĝas, ke eĉ tiuj, kiuj plurfoje insiste petis nin aperi informojn pri la agado de la grupoj, nun, kiam ili havas ŝancon, sendas al ni absolute nenion. Ĉu vi vere ne havas tempon sidigi ĉe la skrbotablo kaj verki kvar-kvin liniojn pri via agado? Vekiĝu, raportantoj!

La redaktoro

DU MÅSTE



vara med i
KOPENHAMN!

Belaj memo- roj el Svedujo

Al Malmö, tiu ĉi urbo en la ĉarma lando de jam de longe sopirata Svedio mi atingis dank al miaj svedaj geamikoj. Mi nun vojaĝis al Lidköping kaj trovis en la domo de mia sveda amiko koran akcepton.

Je la flanko de miaj geamikoj mi per aŭtoveturoj ekkonis la belecojn de tiu ĉi ĉarma parto de Västergötland.

Ni veturis al Skövde kie mi restis kelkajn tagojn ankaŭ ĉe geamikoj de mi. Ni ankaŭ veturis al Adelsåsen, Stora Levene, Läckö, monaĥejo de 16a jarcento. Mi vidis Trollhättan je Göta kanal. Dimanĉe ni faris tutagan aŭtoveturon al Göteborg, dum la vespero ni vizitis Liseberg, la grandan amuzan parkon de Göteborg. Dum la alia veturo mi travivis kelkajn belajn horojn en la ĉarma banloko Hjo ĉe Vättern kie mi ankaŭ vidis vitroblovejon.

Ni renkontis ankaŭ amikon en Mariestad kaj konatulojn en Falköping, gesamideanoj kiujn mi konatiĝis dum la Esperantokongreso en Haarlem, 1954.

Sed ankaŭ mi povis vidi la Esperanto-sidejon en Lidköping kun la Esperanto-biblioteko, kiun zorgeme fle gas la diligenta samideano Viden.

Dum la mezsomera tempo ĉiuloke oni ornamis la tutan landon per majostangoj, girlandoj kaj la belaj svedaj flagoj.

Bedaŭrinde forflugis la tempo en tiu ĉi belega lando kun siaj feliĉaj homoj tro rapide kaj la adiaŭo venis. Estas kiel belega sonĝo nun tiu ĉi vojaĝo kaj mi korege dankas ĉiujn pro liaj bonkoraj helpoj.

Orientberlina s-ano

DU KAN

bli medlem av UEA.

DU KAN INTE

undvara tidningen ES-
PERANTO och årsbo-
ken.

JUST DU KAN

hjälpa UEA ekonomiskt
genom medlemskap.

Avgifter:

80 kr för årsbok och må-
nadstidskriften ESPE-
RANTO.

240 kr för stödjande
medlem.

Ni gratulas

SVEN ALEXANDERSSON
60-jara la 19-an de marto

multjara estrarano de SEF, antaŭe sekretario, nuntempe kasisto. SEF korege gratulas la vere talentan kaj laboreman funkciulon.

Salex multege laboris por esperanto, sed persone li estas modesta homo, kaj tial ni atentis pri lia festotago tro malfrue por antaŭinformi. Se vi tial forgesis gratuli al li, tio estas ankoraŭ riparebla!

SOLVEIG EDVARDSSON
60-jara la 19-an de marto

Unu el la veraj aktivuloj de la stokholma klubo, kiu dum multaj jaroj oferis multe da tempo por kaj faris multan utilon al la esperanta movado.

Korespondu

Interŝanĝas poŝtmarkojn kaj korespondas: Bedrich Motalek, 798 45 Suchdol via Prostějov, Ĉeĥoslovakio.

Kuracisto/specialisto de pulmo-mal sanoj: D-ro Zygmunt MOSKWA, Ul, Pstrowskiego 1, 45-049 OPOLE, Polando.

POLLANDO

La V:a Jubilea Esperanto Fериado en Miedzydroje

La Turisma Oficejo "Gromado" en Szczecin kaj Pola Esperanto-Asocio en Szczecin elkore invitas esperantistojn kaj simpatiantojn de la internacia lingvo esperanto al la V:a Jubilea Esperanto-Feriado en Miedzydroje ĉe Baltika Maro de la 16a—27a de junio 1975.

En la feriadprogramo vi trovos; ripozon ĉe la maro, amuzvesperojn ĉe la kafo kaj muziko, interesajn prelegojn, 3 laŭgradajn kursojn kaj aliajn surprizojn.

La partoprenkotizo en la feriado zL. 1.700: — enhavas: 1) loĝadon en kampadejo (en lignaj somerdometoj), 2) tuttagajn manĝaĵojn (3-foje tage, manĝejo surloke), 3) vesperojn ĉe kafo aŭ muziko (4-foje), 4) kursojn.

Aliĝiloj estas haveblaj ĉe Esperanto-Societo de Gotenburgo, Magasinsgatan 23, tel. 11 58 18.

16-A EUROPA FERIOSEMAJNO EN SVISLANDO (EFS)

Ĝi okazos de la 31-a de aŭg. ĝis la 6-a de sept. 1975 sur Fűrigen apud Stansstad ĉe Vierwaldstätter-lago kaj estas organizita de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj (SAEF). La semajnpromado konsistas el antaŭtagmezaj Esperanto-lecionoj trigradaj, gvidataj ekskursoj variaj kaj vesperaj aranĝoj distraj.

Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Blättli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 BRUGG (Svislando).

VETERANOJ FORPISIS

VIKTOR WALLEBY, Göteborg, mortis 84-jara. Li estis persono kun multaj interesoj, kaj dum multaj jaroj li kaj lia edzino fervore partoprenis la esperantan agadon.

ARTHUR AXELSSON

La 26-an de februaro 1975 forpasis Arthur Axelsson, Karlskoga. Dum pli ol 40-jara membreco de la loka societo kaj kiel prezidanto dum multaj jaroj li faris multan, sindonan laboron por la loka esp.-movado. Per lia firo ni perdis fervoran kunbatalanton kaj varman amikon. Li ripozu en paco.

MONDFEDERACIISMO

Post plurjara interrompo, ekfunkciis denove UNIVERSALA LIGO, kiu antaŭe ludis tre gravan rolon en la movado. Ekde majo aperis kvar numeroj de ĝia BULTENO (Postbus 334, B u s s u m 1351, Nederlando). Inter la aktivuloj de UL troviĝas denove S-ro A. Cseh. Membrokotizo minimume 5 (kvin) nl. guldenoj pageblaj al Amsterdam-Rotterdam Bank, Kneuterdijk 8, Den HAAG NEDERLANDO, Konto N-ro 43 06 97 708.

Al ĉi tiu noto, kiun ni represis el "Heroldo de Esperanto", ni aldonas, ke la egalvaloron en sveda valuto de minimume 10 (dek) sv. kr. oni povas ankaŭ rekte enpigi al la Sveda poŝtgirokonto N-ro 741 75-1 Stockholm (la p. ĝ. kontnumero publikigita en la januara nro de "La Espero" estis erara.)

Efektivigu ĉiujn pagojn je la nomo: UNIVERSALA LIGO, Postbus 334, BUSSUM 1351, NEDERLANDO.

Konstrui per

YTONG[®]

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

60a Universala
Kongreso
de Esperanto
Kopenhago
26.7 - 2.8 '75



Med risk för att verka tjugiga upp-
repar vi vad som sägs på flera ställen
i detta nummer: det är hög tid att
anmäla sig till världskongressen i Kö-
penhamn.

Anmälningar skall sändas till fru
Ester Andrén, Regementsgatan 27 D,
217 53 Malmö (telefon 040-652 09)
som också på begäran sänder anmäl-
ningsblanketter. Avgifter: 184: — kr
för UEA-medlem, 252: — för icke
medlem. I övrigt se föregående num-
mer. Likvid till postgiro 14 74 29-5,
Svenska Esperantoförbundet, Special-
konto, Malmö.

Det är inte för sent

att bli direkt medlem i UEA
1975.

80: — kr för årsbok och tidning.

Sänd avgiften till postgiro
14 74 29-5, Svenska Esperanto-
förbundet.

— Ĉu 83 Andersson scias kiam Karl
XII mortis?

— Ne kapitano, mi eĉ ne scias ke li
estis malsana.

— Ĉu vi povas imagi al vi Malin,
kiam mi venis hejmen hieraŭ mi tro-
vis tute fremdan viron en mia dorm-
ĉambro.

— Ho Asta! Kion vi faris?

— Kion mi farus? Mi donis al li
ordonon foriri ne pli malfrue ol post
24 horoj.


— Pelle, kion signifas la blondaj
haroj sur via jakso?

— Nur ke vi ne brosis ĝin post kiam
vi estis blondulino!

VENONTA NUMERO


Limdato por manuskriptoj:
15 aprilo.

Ere — parkere



Karskva
75.

Sen povo kolero estas ridinda afero
Kiu tro sin pravigas, tiu mem sin
kulpigas



Por ĉiu ago venas tempo de pago

Ĉiu estis junulo, ĉiu estis pekulo

FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO
ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack,
200 42 Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkredo 10.00—11.00
jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la
tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578-5.

★

Administranto: Anna-Greta Strönne
Tel. hejma 040 / 12 92 11

Prez. Sven Sjöblom

La Espero

Svenska Esperantotidningen

Organ för Sv. Esperantoförbundet,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede.
Hägervägen 31.

Postgirokonto 20 12-3.

Ansvarig utgivare: Bertil Akerberg.

Redaktör: Ake Blomberg, Lidåkers-
gatan 6 C, 531 00 Lidköping.

Tel. 0510-286 42 (arb. 0510-221 30).

Medlemsavgift för direkt medl. 25 kr,
ungdom 10 kr, familjemedlem utan
tidning 5 kr.

Prenumerationspris 25 kr.

Förbundets sekretariat är öppet
onsdagar kl. 18—20, tel. 08-48 99 76.

Sturetryckeriet AB - Stockholm 1975